

**Post la ĉi-supre  
priskribita aranĝo  
en Israelo okazis  
"Post KIESo",  
turisma programo  
por la eksterlandaj  
partoprenantoj.**

**D**ek eksterlandanoj  
(el Rusio, Italio  
kaj Japanio) kaj tri  
israelanoj ekveturis post  
KIES de Pac-oazo al la Morta  
Maro. Nia ĉiĉerona blazono  
estis granda verda stelo.  
Post kamel-rajdado apud  
la punkto "alteco nul" ni  
descendis pliajn 400 metrojn  
sub la marnivelo, por vizito de vera oazo Ein Gedi, en la  
Judea dezerto.

Sekvis baniĝado en la Morta Maro, kiu estas ne nur la  
plej malalta loko en la mondo, sed ankaŭ la plej sala, tial

# Internacia PostKIESo en Israelo



ĝia akvo estas tiom densa, ke eblas legi gazeton flosante.  
Ni kompreneble legis la revuon *Esperanto!*

Plej impona estis la vizito de Masado, kie antaŭ naŭ  
jaroj mi ĉiĉeronis tuttagan kongresan ekskurson de la UK



en Telavivo. Kelkajn tagojn pli frue la eksterlanda grupo vidis en muzeo en Jerusalemo la rulaĵojn de la Morta Maro (Kumran), kiuj estis skribitaj samloke kaj samepoke kiel la sieĝo de Masado. Tricent judaj familioj dum tri jaroj kontraŭstaris tri romiajn legiojn, kaj fine sinmortigis por ne esti kaptitaj kaj sklavigitaj. Ni vizitis la Masadan palacon de Herodo, kiu bele konserviĝis dum du mil jaroj, kaj spektis filman prezentadon pri la drama historio de la arkeologia restaŭrado.

Reveninte al Jerusalemo la grupo denove vizitis la malnovan urbon, krom Roza (la sola judino en la grupo), kiu insistis viziti Jad Vashem kaj tiel en unu tago vidis du el la plej gravaj simboloj de la juda popolo. Dum intensa kaj ĝuplena Esperanto-semajno mi akompanis la eksterlandajn gastojn kaj mia ĵipo fariĝis kvazaŭ ilia surrada hejmo.

Daŭrige al la post-KIES-ekskurso al la Morta Maro la eksterlandanoj vizitis la nordan regionon de Israelo. Dum du intensaj tagoj, sub la gvido de la ĉefdelegito Jehoshua Tilleman, ili vizitis la Bahaajn ĝardenojn en Hajfo, la Preĝejon de Anunĉiaco en Nazareto kaj la malnovan urbon de Akko.

Israelaj esperantistoj jam planas la 11-an KIES. Ĝi okazos en la urbo Kacrin (nordo de Israelo) 20-22 de majo 2020.

**Amri Wandel**